

VERDA INFORMILO, n-ro. 2/2026, 23-a de februaro 2026

GRÜNER BOTE, 2/2026, 23. Februar 2026

estas la oficiala informilo de estraroj de Landa Asocio
Meklenburgio-Antaŭpomerio (LAMA) kaj Esperanto-Societo
Neubrandenburg (ESN)
ist das offizielle Mitteilungsblatt der Vorstände des LVMV und
EVN www.esperanto-nb.de, info@esperanto-nb.de

1. Societa kunveno en februaro 2026

La 11-an de februaro 2026 okazis nia societa kunveno en la gastejo „Uns Eck“, kun 7 partoprenintoj.

Nia kunveno komenciĝis je la 15-a horo kaj daŭris ĝis post la krepusko.




Edeltraut kaj Vernereto



Birgit, Bernd, Edeltraut, Vernereto Reneo kaj Margarete

- Vernereto parolis pri propraj nomoj.
- Edeltraut prezentis la Esperantistaron de la jaro 2025 Ranja Zafinifotsy el Madagaskaro.
- René legis el vortaro.net kapvortojn kaj ni aldonis multajn aliajn vortojn. Tio estas bona ripeto de vortrezoro.
- Margarete daŭrigis la tradukadon de la libro „En la olda suno“ („Die alte Sonne“) de Hermann Hesse.
- Ŝi tradukis la oldan germanan

Ranja Robertine Jeanne d’Arc Lydie Zafinifotsy Ep Randrianandrasana estas 29-jara malagasa esperantistino kaj direktorino de lernejo en malriĉa kvartalo de Antananarivo.



Esperanton ŝi eklernis en 2018, kaj en 2021 ŝi iniciatis la refondon de Malagasa Esperanto. Ŝi skribas librojn, instruas nian lingvon kaj intense agadas por Esperanto.

popolkanton „Auf Wiedersehn“ kaj ni kantis.



De maldekstre: Birgit Krüger, Bernd Krüger, Werner Pfennig, René Philipp, Margarete Bastian kaj tute dekstre nia gvidantino Brunhilde Pfennig.

Nia renkontejo Uns Eck en Neubrandenburg en la Turmstrato.

Ĉijare estas vera vintro kun neĝo.



2. Rerigardo al 2025

Societa kunveno en novembro 2025

Dato: 12-a de novembro 2025

Loko: Neubrandenburg, "Uns Eck"

7 partoprenintoj, el kiuj 4 prelegis

Temoj:

- Signifo de la gepatra lingvo, WP,
- Datoj de okazaĵoj 2026, BP,
- Sumoo, EH,
- Aktivaĵoj en la Esperanto-centro Herzberg, EH,
- 86a naskiĝtago, EH,
- Ĉu genra lingvaĵo en Esperanto? Propono de EVN, MB,
- El la romano "die alte Sonne" de Hermann Hesse, MB.

Societa kunveno en decembro 2025

Dato: **10-a de decembro 2025**,

Loko: "Uns Eck", Neubrandenburg,

5 partoprenintoj, el kiuj 3 prelegis

Temoj:

- malgranda festo: 30 jarojn gastejo "Uns Eck", ni ricevis donacojn,
- Zamenhof-festo, genia lingvo, WP,
- Lydia Zamenhof kaj ŝia familio, EH,
- Esperanto en la respubliko Kongo, EH,
- Charles Darwin, kion li diris pri virinoj kaj viroj? MB, EH.

3. LAMA-kunveno 2026

Laŭ la jam dissendita invitilo la LAMA-kunveno okazos la **6-an de majo 2026**, en la urbo Güstrow.

Loko: Frühstücks-Café Schörx en Güstrow; adreso: Zu den Wiesen 8

Komenco: 10:30 horo

Atentigo:

- Ĉiu partoprenanto bonvolu pagi sian tagmanĝon mem!
- Intermanĝo kaj trinkaĵoj estos pagataj el la LAMA- kaso.

4. Lingva angulo

Jen kelkaj interesaj vortoj:

- [ujutna](#) „bonetosa, [komforta](#), [hejmeca](#)“ (laŭ Reta Vortaro)
- [gemuta](#) „sentiganta agrable komfortan hejmecon etoson“ (laŭ testa PIV)
- [vikio](#) „kunlabora retejo, kies enhavo povas esti redaktata per retumilo, ofte fare de iu ajn kun aliro“ (laŭ testa PIV)
- [Vikipedio](#) „libere kunredaktata interreta enciklopedio multlingva, kies Esperanta fako estis fondita en 2011“ (laŭ testa PIV)
- [acero](#) „falfolia arbo aŭ trunkarbusto, kies folioj aŭtune montras belegajn kolorojn (de flavaj ĝis ruĝaj); ĝiaj sekaj fruktoj (dusamaroj) havas du flugilojn; ĝia blanka aŭ hele brunruĝa ligno estas utiligata precipe por mebloj kaj tornaĵoj“ (laŭ testa PIV; bonvolu atenti, ke ĝi pro molekulgenaj esploroj nun apartenas al la familio de sapindacoj)
- [ĥameleono](#) ([kameleono](#)) „reptilio kun longega vermforma lango kaj kapabla ŝanĝi sian koloron“ (laŭ testa PIV)

Anschriften / Adresaro

Redakteur: René Philipp, Pablo-Neruda-Ring 69, DE 17235 Neustrelitz.
tlustulimu@web.de (Achtung: René hat außerdem eine neue Emailadresse:
[rene_philipp_ntz@gmx.de!](mailto:rene_philipp_ntz@gmx.de))

Geschäftsstellen

LAMA, Landesverband MV

André Weber

Retpoŝto: ACW.Esperanto@mailbox.org

Bankverbindung: Inhaber: Landesverband Mecklenburg Vorpommern des DEB,
Sparkasse Neubrandenburg-Demmin, IBAN: DE19 1505 0200 3200 0213 48, BIC:
NOLADE21NBS

Esperanto-Verein Neubrandenburg (EVN)

DE-17034-Neubrandenburg, Uns Hüsung 29 /0705

Tel. 0395 422 13 98

e.-Brief: info@esperanto-nb.de